
# BONA ESPERO



Rundbrief für die Freunde, Förderer
und Mitglieder des Fördervereins
"Bona Espero" e. V.

Cirkulero por amikoj, membroj kaj subtenantoj
de Bona Espero

n-ro 34 Aprilo 1992

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465


---

"Koran dankon pro via letero de la 4a de februaro kaj pro la principa akcepto de la investo-planoj por Bona Espero. En aprilo okazos la jara asambleo de BE kaj tuj poste ni informos vin pri la rezultoj." Tion skribis G. Grattapaglia la 19an de marto.
Informi pri la asambleaj rezultoj ni ankoraŭ ne povas. Sed trankvilige bonaspektan kasraporton ni povas prezenti, pruvo, ke ni ĉiuj bone mastrumis. Vi, fidinde subtenante, ni estraranoj zorge plimultigante, kaj la bonesperanoj ne elspezante, kio troviĝas sur la kontoj. Almenaŭ provizore ne, kvankam planoj ekzistis kaj decidoj estas faritaj. La sumoj, konservitaj sur Sparda-Bank-kontoj, atendas elspezon por nova kamioneto kaj nova, pli granda akvoprovizejo. La VW-buseto, aĉetita antaŭ 7 jaroj, veturis preskaŭ 100.000 km. Ankoraŭ ĝi ne disfalas. Oni povas ĝin vendi antaŭ ol la temporabaj, multekostaj riparoj komenciĝas. Kiuj vizitis antaŭ 10 jaroj BE-n memoras pri la unua buseto, kun pordoj, fiksitaj per forta ŝnuro kaj ankaŭ cetere disfalanta. Tamen, motoron ĝi havis ĝis la fino. Nur mokemuloj asertis, ke tra la truigita planko infanpiedoj estis videblaj, kiuj movis ĝin.

La dua granda investo ĉijare atingis intertempe la pinton sur la LISTO DE DEZIROJ. Akvo kutime sufiĉas. Eĉ dum la seka sezono ĝi ne mankus en domo kaj ĝardeno, se la kapacito de la provizejo estus pli granda. Krome la nuna havas timigajn fendojn kaj la plenkreskuloj en BE ofte zorgoplene rigardas ĝin. Proksimume 10.000,-GM kostos nova, pli granda baseno. La 15.000,-GM necesas aldone elspezi por anstataŭi la kamioneton.

"Herzlichen Dank für Euren Brief vom 4. Febr. und für die grundsätzliche Zustimmung zu unseren Investitionsplänen für Bon Espero. Im April wird die Jahresversammlung von BE sein und wir werden Euch anschließend sofort über die Ergebnisse informieren." Das schrieb G. Grattapaglia am 19. März. Über Ergebnisse können wir noch nicht berichten. Aber einen beruhigend soliden Kassenbericht können wir vorstellen als Beweis, daß wir alle gut gewirtschaftet haben. Sie, durch Ihre treue Unterstützung, der Vorstand, indem er es verantwortungsvoll gemehrt hat und die Bonesperaner, weil sie nicht ausgegeben haben, was sich auf den Konten befindet. Diese Summen warten darauf für einen neuen Bulli und einen größeren Wassertank ausgegeben zu werden. Der vor sieben Jahren gekaufte VW-Bus hat inzwischen fast 100.000 km gefahren. Er fällt noch nicht auseinander. Man kann ihn noch verkaufen, bevor die zeitaufwendigen, teuren Reperaturen beginnen. Wer vor 10 Jahren BE besucht hat, kann sich an den ersten Bus erinnern, an dem die Türen mit dicken Schnüren festgebunden waren und auch manches andere auseinander fiel. Dennoch, einen Motor hatte er bis zum Schluß. Nur Spötter behaupteten, daß durch den durchlöcherten Boden Kinderfüße sichtbar waren, die ihn bewegten.

Die zweite große Investition dieses Jahres steht inzwischen an der Spitze der Wunschliste. Es gibt ja Wasser genug, auch in der Trockenzeit würde es nicht in Haus und Garten fehlen, wenn das Fassungsvermögen des Tanks größer wäre. Außerdem hat der jetzige gefährlich aussehende Risse. Die Erwachsenen in BE sehen das voller Sorge. Ungefähr 10.000,-DM kostet ein neuer, größerer Behälter. 15.000,-DM müssen zusätzlich für den neuen Bulli ausgegeben werden.

# Förderverein "BONA ESPERO" e. V.

**Gegründet am 24.03.1981**
**Eingetragen unter Gem V 1028 - Finanzamt Münster-Stadt**

Kto: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60, Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Kto: Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 400 100 46, Kto-nr. 2033-99-465

## Kassenbericht 1991 — Kasraporto 1991

### Einnahmen/enspezoj

| | | |
|---|---|---|
| Beiträge, Spenden | 24.130,11 | kotizoj/donacoj |
| Bankzinsen | 1.600,92 | interezo |
| | 25.731,03 DM | |

### Ausgaben/elspezoj

| | | |
|---|---|---|
| Barzahlung an BE Brasilien | 5.000,- | kontante al BE Brazilo |
| Bankgebühren | 30,46 | bankspezoj |
| Kontogebühren PGA | 33,70 | kontokotizoj postĝiraj |
| Portokosten für Information, Korrespondenz und Werbung | 263,95 | afranko por informo, korespondado, varbado |
| Paketgebühren für Sachspenden | 266,50 | ekspedkostoj por pakaĵoj |
| Druckkosten, Fotokopien | 520,07 | preskostoj, fotokopioj |
| | 6.114,68 DM | |

| | | |
|---|---|---|
| Guthaben am 31. 12. 1990 | 19.737,94 DM | kontostato 31. 12. 1990 |
| Guthaben am 31. 12. 1991 | 39.354,29 DM | kontostato 31. 12. 1991 |
| verfügbares Guthaben am 31. 12. 1991 | 4.354,29 DM | je dispono |
| Rückstellung für Investitionen (Fahrzeug, Wassertank) | 35.000,00 DM | rezervita por investoj (kamioneto, akvo-provizejo) |

Telgte, 5. April 1992

## Auch ein Teil unserer Unterstützung

Denn Adarci, Maria und Rosamira aus BE konnten Ende Januar am brasilianischen Esperanto-Jugend-Kongreß teilnehmen. Alle drei haben liebe Dankesbriefe geschrieben. Der von Adarci ist auch für Nicht-Esperantisten leicht zu verstehn.

## Ankaŭ rezulto de nia subteno

Ĉar Adarci, Maria kaj Rosamira el BE partoprenis la brazilan, junularan Esperanto-kongreson en Barra do Graca/Mato Grosso. Ĉiuj tri sendis afablajn dankleterojn. Legu tiun de Adarci originale!

Mi deziras danki al vi kaj la societo pro la 800 dolaroj, kiujn vi sendis en la fino de la jaro. Mi uzos ĝin por helpi mian familion kaj por vojaĝi al Esperanto-Kunvenoj.

Morgaŭ mi vojaĝos kun Maria kaj Rosamira al junula renkontiĝo de esperanto. Ni vojaĝos kun aliaj tri junulinoj al Alto Paraiso. Ni esperas, ke estos tre gaja kaj interesa!

Sa kunveno estos en Mato Grosso, tre aventura vojaĝo!

Korajn salutojn al ĉiuj miaj konataj.

Kore via

Adarci

So sieht die Schule jetzt aus!

Tiel aspektas nun la lernejo!



## BONA ESPERO EN TELEVIDO!

Ne nur unu fojon sed du aŭ eĉ tri fojojn? Multaj videobendoj pleniĝis. Oni komparis, interŝanĝis kaj konstatis: Principe ĉiam la sama kaj multaj 'neinformoj'. Tiujn ne-informojn eliminis Bernd Schönberner kaj preparis duonhoran videobendon, nun vere interesan. Se vi deziras lupreni ĝin, skribu al:

Margret Brandenburg, Brinker Damm 24
D-4404 TELGTE


kiu ankaŭ ĉifoje respondecas pri la enhavo de tiu ĉi cirkulaĵo.

## BONA ESPERO IM FERNSEHEN!

Und nicht nur einmal, zwei- oder gar dreimal? Viele Videobänder wurden bespielt, ausgetauscht, verglichen und festgestellt: Eigentlich immer dasselbe und viele 'Nichtinformationen Diese hat Bernd Schönberner herausgeschnitten und ein halbstündiges, nun wirklich interessantes Video-Band zusammengestellt. Wer es ausleihen möchte schreibe bitte an:
Margret Brandenburg

Antaŭ 7 jaroj brazila registaro kvazaŭ kunfinancis la nunan veturilon. Siatempe freŝaj, ankoraŭ ne konsumitaj parlamentanoj decidis, verve lukti kontraŭ la inflacio. Ili draste fiksis la prezojn, i.a. tiujn de VW-busetoj. 13.000,-GM ĝi kostis - dum mallonga tempo - sufiĉe longa por havigi unu por BE. Ni esperu pri novaj balotoj kaj freŝaj parlamentanoj ankoraŭ ĉi-jare!

Vor sieben Jahren hat der brasilianische Staat den jetzigen Bulli indirekt mitfinanziert. Damals beschloß en neue, noch nicht verschlissene Regierung, mit Macht die Inflation zu bekämpfen. Rigoros setzte sie die Preise fest, u.a. die von VW-Kleinbussen. 13.000,-DM kostete das Stück - nur kurze Zeit - lange genug um für BE einen zu kaufen. Hoffentlich gibt es Neuwahlen und frische Parlamentarier noch in diesem Jahr!



Kiu ankoraŭ konas Amanda, Alessan, Jilza, Neuza, Valdemar, João Santana kaj Maria Madalena? Ĉiuj apartenas al la malnovaj infanoj en BE kaj nun ili finis la okan klason. Ĉe ni tio estas komparebla kun finlernado en elementa lernejo, sed en Brazilo nur 18 % el tiuj infanoj, kiuj entute iras al la lernejo, finas la okan klason.

La atestilojn oni solene transdonis dum la Zamenhof-festo, la 15an de decembro kaj ĉeestis ĉiuj lernejanoj, gepatroj, publikaj funkciuloj de la komunumo. Pli ol 100 personojn oni invitis kaj unuan fojon oni utiligis la novan parton de la lernejo.

Wer kennt noch Amanda, Alessan, Jilza Neuza, Valdemar, João Santana und Maria Madalena? Alle gehören zu den "alten" Kindern in BE und haben j[illegible]zt den Abschluß der 8. Klasse gemacht. Bei und ist das dem Hauptschulabschlu[illegible] vergleichbar, aber in Brasilien erreichen von den Kindern, die überhaupt die Schule besuchen, nur 18 % die achte Klasse.

Die Zeugnisse wurden ihnen feierlich am 15. Dezember beim Zamenhof-Fest überreicht, in Gegenwart von Mitschülern, Eltern und offiziellen Vertretern der Gemeinde. Mehr als 100 Personen waren eingeladen und man konnte zum ersten Mal den neuen Schulteil mitbenutzen.



Das war die kleine Schule

Tio estis la malgranda lernejo